## Integrita trafika sistemo de la Sudmoravia regiono



En la Integrita Publika Transporta Sistemo de la Sudmoravia Regiono (ĉeĥa mallongigo estas IDS JMK) estas konektitaj ĉiuj tipoj de publika transportado. IDS JMK ofertas konekton en la tuta parto de Sudmoravia Regiono kaj ankaŭ en la ĉefurbo de la regiono, Brno. Sub samaj kondiĉoj oni rajtas veturi per personaj trajnoj, rapidtrajnoj, regionaj busoj, uzi urban trafikon en la ĉefurbo Brno (tramoj, trolebusoj kaj busoj) kaj urban trafikon en aliaj urboj (Adamov, Blansko, Břeclav, Hodonín, Kyjov, Mikulov, Vyškov kaj Znojmo). En ĉiuj tiuj linioj validas samaj biletoj, sama tarifo kaj similaj kondiĉoj. Estas kelkaj esceptoj: oni ne povas uzi biletojn de IDS JMK en rapidtrajnoj, kiuj ne estas integritaj, en trajnoj de kategorio Ex, IC, EC kaj SC. Estas ankaŭ kelkaj buslinioj, kiuj ne estas integritaj. En IDS JMK estas uzata tarifo uzebla por ŝanĝoj inter linioj. Ĉiu vojaĝanto rajtas veturi en ĉiuj linioj de IDS JMK, sed kompreneble nur laŭ tempa kaj zona valideco de lia bileto. Ĉiu vojaĝanto do rajtas laŭbezone uzi alian linion, se validas lia bileto. Vi ja ne povas ŝanĝi havante bileton por 2 zonoj por 10 minutoj.



Biletoj aĉeteblas en ĉiuj integritaj trajnstacioj, en vendejoj de Transporta Kompanio de Brno (DPMB), en Brno en aŭtomatoj, ofte eblas aĉeti biletojn ĉe gazetvendistoj aŭ ĉe poŝtoficejoj. Oni povas aĉeti biletojn ĉe ŝoforo, sed en Brno en linioj 1 ĝis 99 kun krompago, en buslinioj 100 – 999 sen krompago. Konduktoroj en trajnoj ne vendas biletojn de IDS JMK (ili vendas nur klasikajn trajnajn biletojn). Ĉe busŝoforo ne eblas ja aĉeti alian bileton ol por unuopa vojaĝo.

Se vi ne aĉetis bileton ĉe ŝoforo, vi devas nepre validigi vian bileton per stampado en validigilo, kiu troviĝas proksime ĉe ĉiu pordo. Se vi vojaĝas per trajno, validigu bileton antaŭ entrajniĝo (validigiloj estas ĉe stacioj). En kazo de ŝanĝo al alia linio vi jam ne devas validigi bileton denove! Atenton: kalkulu ĉiam, por kiom da zonoj vi bezonas bileton. Ekzemple se vi volus vojaĝi de Brno (de zono 100) al zono 215 (kiu situas tuj ĉe Brno), vi bezonas du-zonan bileton.



Por turistoj rekomendeblas tuttaga bileto por 24 horoj kontraŭ 80 kronoj (plimalpli 3,2 €), kiu taŭgas por tuttaga ekskurso en Brno. Tiu ĉi bileto validas en ambaŭaj zonoj de Brno (100 kaj 101) kaj ili estas validaj 24 horojn post la validiga stampado. Kutime, ĝi estas nur por unu homo, sed dum la semajnfinoj ili ĉiam validas por du homoj super 15 jaroj kaj tri homoj ĝis 15 jaroj. Eblas aĉeti ankaŭ bileton por tuta Sudmoravia Regiono kontraŭ 190 kronoj (7,6 €) kun samaj kondiĉoj. Oni povas aĉeti ankaŭ por 3, 7, 14 kaj 30 tagoj. Plej granda avantaĝo de tiuj ĉi biletoj estas, ke ili povas esti facile transdonitaj al aliaj homoj (ekzemple vi estas en grupo de 4 homoj, kaj unu tagon du el vi uzos bileton, la duan tagon aliaj du).

En kazo de pli longa vizito kaj pli oftaj vojaĝoj en Sudmoravia Regiono aŭ en Brno estas avantaĝa aĉeti long-tempajn biletojn. Ili vendeblas en trajnaj stacioj, en vendejoj de Transporta Kompanio de Brno aŭ en magistratejoj (urbaj, kvartalaj, vilaĝaj). Ilia valideco: unu monato, tri monatoj aŭ tuta jaro. Vi bezonos pasportan foton (grandeco 3,5 x 4,5 cm) kaj vian identigilon. La valideco de long-tempa bileto estas laŭ via bezono (do vi povas libere elekti, kiam vi volas ekuzi ĝin).



Kaŝpasaĝerumi estas multekosta. Ni havas biletkontrolistojn, kiuj povas peti vin montri la bileton iam ajn. La punmono povas esti eĉ 40 €!

Ni dankas por via atento kaj deziras al vi feliĉan vojaĝon kaj agrablan restadon en Sudmoravia Regiono.

**Ni dankas al vi por uzado de IDS JMK, vi ŝparas naturon por viaj infanoj!**